

# The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL<sup>o</sup> XVI. N-RO 184.

APRIL, 1920.

PREZO 4 PENCOJ.

AFRANKITE  
5 PENCOJ.

**KOSTO DE ABONO.**—En Britujo, afrankite: por unu jaro, 5 ŝilingoj; unu numero, 5 pencoj.

*Eksterlande*, afrankite: por unu jaro, 5 ŝilingoj per poštmandato aŭ 25 respond-kuponoj kun poštsgnoj.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komenciĝo de ĉiu monato. Sin turni al la Sekretario, 17, Hart-street, London, W.C.1.

• • •

**REDAKCIO.**—Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redakcio, 17, Hart-street, London, W.C.1. Tradukintoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certigi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permisas la represigon.

Pri artikoloj la Redakcio rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas artikolojn neakceptitajn.

**ANONCOJ.**—Prianoncoj, sin turni alla Administracio, THE BRITISH ESPERANTIST, 17, Hart-street, W.C.1.—Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas enpresataj po 3 ŝilingoj por kvar linioj.

## ENHAZO.

|  | PAGO. |
|--|-------|
| Rakontoj el la Biblio. D-ro L. L. ZAMENHOF   | 49    |
| Kokino kaj Inkubatoro ...  | 53    |
| La Nederlanda Lingvo per Esperanto   | 54    |
| Esperanto kaj Telegrafo sen Fadenoj. D-ro P. CORRET                                    | 55    |
| Competition for Boys and Girls. Miss J. BAIRD  | 56    |
| Nekrologoj: JOSEPH RHODES, Pastro A. P. SOUTHEE, Pastro C. J. SENIOR                   | 57    |
| Chronicle—Coming Events  | 57    |
| 11th Congress of British Esperantists  | 60    |
| XIIa Universala Kongreso en Hago...  | 61    |
| Novaj libroj, Recenĝoj de  | 62    |
| B.E.A. Council Meeting...  | 62    |
| B.E.A. List of Guarantors 1920, Appeal for Funds, Donations, Candidates for Membership | 63    |
| B.E.A., New Fellow and Delegates, Examinations, F.K.I.                                 | 64    |

## Rakontoj el la Biblio

tradukitaj de D-ro L. L. ZAMENHOF.

(redaktitaj laŭ afabla permeso de la Esperantista Biblia Komitato).

### IV. Samuel kaj Saul.

#### LA ALVOKO AL SAMUEL.

La knabo Samuel servadis al la Eternulo antaŭ Eli. Kaj la vorto de la Eternulo estis grandpreza en tiu tempo; ne aperadis ofte profetaj vizioj.

En tiu tempo unu fojon Eli kuſiſ sur sia loko. Lia vidado komencis malakriĝi, ke li ne povis vidi, kaj la lucerno de Dio ankoraŭ ne estingiĝis. Kaj Samuel kuſiſ en la templo de la Eternulo, kie estis la kesto de Dio.

Tiam la Eternulo vokis Samuelon, kaj ĉi tiu diris:

— Jen mi estas.

Kaj li kuris al Eli, kaj diris:

— Jen mi estas, kiel vi vokis min.

Sed tiu diris:

— Mi ne vokis. Iru returne kaj kuſiſu.

Kaj li iris kaj kuſiſis.

Kaj la Eternulo denove vokis Samuelon, kaj Samuel leviĝis kaj iris al Eli, kaj diris:

— Jen mi estas, kiel vi vokis min.

Sed tiu diris:

— Mi ne vokis, mia filo. Iru returne kaj kuſiſu.

Samuel ankoraŭ ne konis la Eternulon, kaj ankoraŭ ne estis revelaciita al li la vorto de la Eternulo.

Kaj la Eternulo denove vokis Samuelon la trian fojon; kaj li leviĝis kaj iris al Eli, kaj diris:

— Jen mi estas, kiel vi vokis min.

Tiam Eli komprenis, ke la Eternulo vokas la knabon. Kaj Eli diris al Samuel:

— Iru, kuſiſu; kaj se vi estos vokata, tiam diru: “ Parolu, ho Eternulo, ĉar Via sklavo aŭskultas.”

Kaj Samuel iris, kaj kuſiſis sur sia loko.

Kaj venis la Eternulo, kaj starigis, kaj vokis kiel la antaŭajn fojojn:

— Samuel! Samuel!

Kaj Samuel diris:

— Parolu, ĉar Via sklavo aŭskultas.

Tiam la Eternulo diris al Samuel:

— Jen Mi faros en Izrael tian faron, ke al ĉiu, kiu tion aŭdos, eksonoros ambaŭ liaj oreloj. En tiu tago Mi plenumos super Eli ĉion, kion

Mi diris pri lia domo ; Mi komencos kaj finos. Mi sciigis al li, ke Mi jugos lian domon por ciam pro la krimo, ke li sciis, ke liaj filoj agas malbone, kaj li ne detenis ilin. Kaj tial Mi juris al la domo de Eli, ke neniam pekliberiĝos la krimo de la domo de Eli per buĉofero nek per farunofero.

Kaj Samuel kuſis ĝis mateno. Poste li malfermis la pordojn de la domo de la Eternulo. Sed Samuel timis raporti pri la vizio al Eli. Kaj Eli vokis Samuelon, kaj diris :

— Samuel, mia filo !

Kaj ĉi tiu diris :

— Jen mi estas.

Kaj tiu diris :

— Kia estas la afero, pri kiu Li parolis al vi ? Mi petas, ne kaſu antaŭ mi. Tion kaj ankoraŭ pli faru al vi Dio, se vi kaſos antaŭ mi ion el ĉio, kion Li diris al vi.

Kaj Samuel rakontis al li ĉion, kaj nenion kaſis antaŭ li.

Kaj li diris :

— Li estas la Eternulo. Li faru tion, kio plaĉas al Li.

Kaj Samuel kreskis, kaj la Eternulo estis kun li. Kaj neniu el Liaj vortoj li faligis sur la teron. Kaj ekseniis la tutę Izrael, de Dan ĝis Beer-Šeba, ke Samuel fariĝis fidinda profeto de la Eternulo. Kaj la Eternulo plue aperadis en Ŝilo, post kiam la Eternulo revelaciis Sin al Samuel en Ŝilo per la parolo de la Eternulo. Kaj Samuel parolis al la tuta Izrael.

### LA SANKTOLEADO DE SAUL.

Estis viro el la Benjamidoj, kiu havis la nomon Kiš, filo de Abiel, filo de Ceror, filo de Behorat, filo de Afiah, Benjamido, viro fortia. Li havis filon, kies nomo estis Saul. Ĉi tiu estis junia kaj bela, kaj neniu el la Izraelidoj estis pli bela ol li. De siaj ŝultroj supren li estis pli alta ol la tuta popolo.

Perdiĝis azeninoj de Kiš, patro de Saul. Kaj Kiš diris al sia filo Saul :

— Prenu kun vi unu el la junuloj, kaj leviĝu, kaj iru serĉi la azeninojn.

Kaj li iris sur la monto de Efraim kaj trairis la landon Ŝališa, sed ili ne trovis ; kaj ili trairis la landon Ŝaalim, sed tie ne troviĝis ; kaj li trairis la landon de Benjamen, sed ili ne trovis. Kiam ili venis en la landon Cuf, Saul diris al la junulo, kiu estis kun li :

— Venu, ni reiru hejmen, ĉar alie mia patro eble ĉesos pensi pri la azeninoj, kaj estos maltrankvila pri ni.

Kaj tiu diris al li :

— Jen en ĉi tiu urbo estas Dia homo, homo respektata. Ĉio, kion li diras, nepre plenum-

igas. Ni iru do tien, eble li montrros al ni la vojon, kiun ni devas iri.

Kaj Saul diris al sia junulo :

— Bone, ni iros ; sed kion ni alportos al la homo ? ĉar la pano elcerpiĝis en nia sako, kaj ni havas nenian donacon, por alporti al la Dia homo. Kion ni havas ?

La junulo plue respondis al Saul kaj diris :

— Jen en mia mano troviĝas kvarono de argenta siklo. Mi donos ĝin al la Dia homo, kaj li montrros al ni la vojon.

En la antaŭa tempo ĉe Izrael oni tiel diradis, kiam oni iris demandi Dion : “ Ni iru al la vidanto ” ; ĉar kion oni nun nomas profeto, oni antaŭe nomis vidanto.

Kaj Saul diris al sia junulo :

— Bone vi diris ; ni iru.

Kaj ili iris en la urbon, en kiu loĝis la Dia homo.

Irante supren en la urbon, ili renkontis knabinojn, kiuj eliris por ĉerpi akvon. Kaj ili diris al tiuj :

— Ĉu la vidanto estas ĉi tie ?

Kaj tiuj respondis al ili kaj diris :

— Ci tie. Jen li estas antaŭ vi. Nun rapidu, ĉar hodiaŭ li venis en la urbon, ĉar hodiaŭ la popolo alportas buĉoferon sur la altaĵo. Kiam vi eniros en la urbon, vi tuj trovos lin, antaŭ ol li iros sur la altaĵon, por manĝi ; ĉar la popolo ne manĝas antaŭ lia veno, ĉar li benas la buĉoferon, kaj nur poste manĝas la invititoj. Iru do, ĉar nun vi lin trovos.

Kaj ili iris supren en la urbon. Apenaŭ ili venis en la mezon de la urbo, jen Samuel eliras renkonte al ili, por iri sur la altaĵon. Dume la Eternulo revelaciis al la oreloj de Samuel unu tagon antaŭ la veno de Saul, dirante :

— Morgaŭ en ĉi tiu tempo Mi sendos al vi homon el la lando de Benjamen, kaj vi sanktoles lin kiel ĉefon super mia popolo Izrael, kaj li savos Mian popolon el la manoj de la Filiștoj ; ĉar Mi vidis Mian popolon, kaj ĝiaj krioj atingis Min.

Kiam Samuel ekvidis Saulon, la Eternulo diris al li :

— Jen estas la homo, pri kiu Mi diris al vi, ke li regos super Mia popolo.

Saul alproksimiĝis al Samuel en la pordego, kaj diris :

— Diru al mi, mi petas, kie estas ĉi tie la domo de la vidanto ?

Kaj Samuel respondis al Saul kaj diris :

— Mi estas la vidanto. Iru antaŭ mi sur la altaĵon. Vi manĝos kun mi hodiaŭ, kaj morgaŭ mi lasos vin for, kaj mi diros al vi ĉion, kio estas en via koro. Kaj pri la azeninoj

kiuj perdiĝis ĉe vi antaŭ tri tagoj, ne zorgu, ĉar ili estas trovitaj. Kaj al kiu apartenas ĉio plej bona en Izrael? Ĉu ne al vi kaj al la tuta domo de via patro?

Saul respondis kaj diris:

— Mi estas ja Benjamido, el la plej malgrandaj triboj de Izrael, kaj mia familio estas la plej malgranda el ĉiuj familioj de la tribo de Benjamen. Kial do vi diris al mi tiajn vortojn?

Tiam Samuel prenis Saulon kaj lian junulon, kaj enkondukis ilin en la mangōčambron, kaj donis al ili lokon supraloke de la invititoj, kiuj estis en la nombro de ĉirkaŭ tridek homoj.

Kaj Samuel diris al la kuiristo:

— Donu tiun porcion, kiun mi donis al vi kaj pri kiu mi diris al vi, ke vi retenu ĝin ĉe vi.

Kaj la kuiristo prezantis ŝultrajon, kaj tion, kio estis kun ĝi, kaj metis tion antaŭ Saulon, kaj Samuel diris:

— Jen estas, kio restis. Metu ĝin antaŭ vin kaj manĝu, ĉar ĝi estas rezervita por vi por la tempo, por kiu mi invitis la popolon.

Kaj Saul manĝis kun Samuel en tiu tago. Kaj ili malsupreniris de la altaĵo en la urbon, kaj Samuel parolis kun Saul sur la tegmento. Kaj ili leviĝis frue; kaj kiam la matenruĝo leviĝis, Samuel vokis Saulon sur la tegmenton, kaj diris:

— Leviĝu, mi lasos vin for.

Kaj Saul leviĝis, kaj ili eliris ambaŭ, li kaj Samuel eksteren. Kiam ili atingis la finon de la urbo, Samuel diris al Saul:

— Diru al la junulo, ke li iru antaŭen (kaj tiu iris antaŭen); kaj vi haltu nun, kaj mi anoncos al vi la diron de Dio.

Tiam Samuel prenis kruĉeton kun oleo, kaj verſis sur lian kapon, kaj kisis lin, kaj diris:

— Vidu, la Eternulo sanktoleis vin kiel ĉefon super Sia heredajo. Kiam vi hodiaŭ foriros de mi, vi trovos ĉe la tombo de Rahel, en la regiono de Benjamen, en Celcaħ, du homojn, kiuj diros al vi: "Estas trovitaj la azeninoj, kiujn vi iris serĉi, kaj jen via patro ĉesis pensi pri la azeninoj kaj estas maltrankvila pri vi, dirante: 'Kion mi faru koncerne mian filon?'" Kaj tiam vi foriros de tie pluen, kaj venos al la kverko de Tabor, renkontos vin tie tri homoj, irantaj al Dio en Bet-Elon. Unu portas tri kapridojn, la dua portas tri bulojn da pano, kaj la tria portas felsakon da vino. Kaj ili salutos vin, kaj donos al vi du panojn; kaj vi prenu el iliaj manoj. Poste vi venos al la monteto de Dio, kie estas starejo de la Filiștoj; kaj kiam vi tie eniros en la urbon, vi renkontos grupon da profetoj, irantaj malsupren de la altaĵo, kaj antaŭ ili psalterion, tamburon, fluton, kaj harpon, kaj ili profetas. Kaj penetras vin

la spirito de la Eternulo, kaj vi ekprofetas kune kun ili, kaj vi fariĝos alia homo. Kiam plenumiĝos super vi ĉi tiuj antaŭsignoj, tiam faru, kion bontrovos via mano, ĉar Dio estas kun vi. Kaj vi iros antaŭ mi en Gilgalon; poste mi venos al vi, por fari bruloferojn, por buči pacoferojn. Sep tagojn atendu, ĝis mi venos al vi, kaj sciigos al vi, kion vi devas fari.

Kaj kiam li turnis siajn ŝultrojn, por foriri de Samuel, Dio donis al li alian koron, kaj ĉiuj tiuj antaŭsignoj plenumiĝis en tiu tago. Kiam ili venis tien al la monteto, jen grupo da profetoj iras al li renkonte. Kaj penetras lin la spirito de la Eternulo, kaj li ekprofetis meze de ili. Kaj kiam ĉiuj, kiuj konis lin de antaŭe, vidis, ke li profetas kun profetoj, tiam la homoj diris unu al alia:

— Kio fariĝis kun la filo de Kiš? Ĉu ankaŭ Saul estas inter la profetoj?

Kaj unu el tie respondis kaj diris:

— Kiu estas ilia patro?

De tio devenis la proverbo: "Ĉu ankaŭ Saul estas inter la profetoj?"

Kaj ĉesinte profeti, li venis sur la altaĵon. Kaj la onklo de Saul diris al li kaj al lia junulo:

— Kien vi iris?

Kaj li respondis:

— Por serĉi la azeninojn; sed kiam ni vidis, ke ili ne troviĝas, ni iris al Samuel.

Tiam diris la onklo de Saul:

— Diru al mi, mi petas, kion diris al vi Samuel. Kaj Saul diris al sia onklo:

— Li diris al ni, ke la azeninoj estas trovitaj. Sed tion, kion Samuel diris pri la regado, li ne diris al li.

Dume Samuel kunvenigis la popolon al la Eternulo en Micpan.

Kaj li diris al la Izraelidoj:

— Tiel diris la Eternulo, Dio de Israel; Mi elkondukis Izraelon el Egiptujo, kaj savis vin el la manoj de la Egiptoj kaj el la manoj de ĉiuj regnoj, kiuj premis vin; sed vi nun forrifuzis vian Dion, kiu savos vin el ĉiuj viaj mizeroj kaj suferoj, ĉar vi diris al Li: reĝon starigu super ni. Stariĝu do nun antaŭ la Eternulo laŭ viaj triboj kaj familioj.

Kaj Samuel alvenigis ĉiujn tribojn de Izrael, kaj la loto trafis la tribon de Benjamen. Kaj li alvenigis la tribon de Benjamen laŭ ĝiaj familioj, kaj la loto trafis la familion de Matri, kaj la loto trafis Saulon, filon de Kiš. Oni serĉis lin, sed oni lin ne trovis. Tiam oni demandis ankoraŭ la Eternulon:

— Ĉu la viro ankoraŭ venos ĉi tien?

Kaj la Eternulo diris:

— Jen li kaŝis sin inter la vazaro.

Kaj oni kuris, kaj prenis lin de tie; kaj li

stariĝis meze de la popolo, kaj de la ŝultroj supren li estis pli alta ol la tuta popolo.

Kaj Samuel diris al la tuta popolo :

— Ĉu vi vidas, kiun la Eternulo elektis ?  
Car ne ekzistas simila al li en la tuta popolo.

Kaj la tuta popolo ekkriis kaj diris :

— Vivu la reĝo !

### SAUL KAJ LA AŪGURISTINO DE EN-DOR.

Okazis en tiu tempo, ke la Filiștoj kolektis sian militistarion, por militi kontraŭ Izrael. Kaj Ahis diris al David :

— Sciu, ke vi iros kun mi en la militon, vi kaj viaj viroj.

Kaj David diris al Ahis :

— Tial vi ekscios, kion faros via sklavo.

Kaj Ahis diris al David :

— Mi faros vin por ĉiam mia kapgardisto.

Dume Samuel mortis, kaj ĉiuj Izraelidoj lin priploris, kaj enterigis lin en Rama, en lia urbo. Kaj Saul estis ekstermina el la lando ĉiujn sorĉistojn kaj aūguristojn.

Kiam la Filiștoj kolektiĝis kaj venis kaj starigis tendare en Sunem, tiam Saul kolektis ĉiujn Izraelidojn, kaj ili starigis tendare en Gilboa. Kiam Saul ekvidis la tendaron de la Filiștoj, li ektimis, kaj lia koro forte ektremis. Kaj Saul petis konsilon ĉe la Eternulo ; sed la Eternulo ne respondis al li, nek per songoj, nek per pastroj, nek per profetoj. Tiam Saul diris al siaj servantoj :

— Elserĉu al mi virinon, kiu scipovas aūguri, por ke mi iru al ŝi kaj ricevu de ŝi informojn.

Kaj liaj servantoj diris :

— Jen ekzistas virino, kiu scipovas aūguri, en En-Dor.

Tiam Saul ŝanĝis siajn vestojn, metis sur sin aliajn vestojn, kaj iris kune kun du viroj, kaj ili venis al la virino nokte.

Kaj li diris :

— Aūguru al mi, mi petas, per via aūgura scipovado, kaj elvoku al mi tiun, pri kiu mi diros al vi.

Sed la virino diris al li :

— Vi scias ja, kion faris Saul, kiu ekstermis la sorĉistojn kaj la aūguristojn el la lando. Kial do vi volas retkapti mian animon, por pereigi min ?

Tiam Saul juris al ŝi per la Eternulo, dirante :

— Kiel vivas la Eternulo, ne trafos vin puno pro ĉi tiu afero.

Kaj la virino diris :

— Kiun mi alvoku al vi ?

Kaj li diris :

— Samuelon elvoku al mi.

Kiam la virino ekvidis Samuelon, ŝi ekkriis per laŭta voĉo ; kaj la virino diris al Saul :

— Kial vi min trompis ? Vi estas ja Saul,

Sed la reĝo diris al ŝi :

— Ne timu. Kion vi vidis ?

Kaj la virino diris al Saul :

— Iun dian mi vidis levigantan el la tero.

Kaj li diris al ŝi :

— Kia estas lia aspekto ?

Kaj ŝi diris :

— Leviĝas viro maljuna, kaj li estas vestita per pastra tuniko.

Tiam Saul komprenis, ke tio estas Samuel ; kaj li klinis sin kun la vizaĝo ĝis la tero, kaj faris adorsaluton.

Tiam Samuel diris al Saul :

— Kial vi maltrankviligis min, elvokante min supren ?

Kaj Saul respondis :

— Mi estas en tre premita stato. La Filiștoj militas kontraŭ mi, kaj Dio fortunis sin de mi kaj plu ne respondas al mi per profetoj nek per songoj. Tial mi vokis vin, por ke vi sciigu al mi, kion mi devas fari.

Sed Samuel diris :

— Kial do vi demandas min, se la Eternulo fortunis sin de vi kaj transiris al via konkurenco ? Kaj la Eternulo faros al li, kion Li diris per mi ; kaj la Eternulo elsiros la regnon el viaj manoj, kaj donos ĝin al via proksimulo David. Ĉar vi ne aŭskultis la vocon de la Eternulo kaj ne plenumis Lian flaman koleron kontraŭ Amalek, tial ĉi tion faris hodiaŭ la Eternulo al vi ; kaj la Eternulo transdonos kune kun vi ankaŭ Izraelon en la manojn de la Filiștoj ; kaj morgaŭ vi kaj viaj filoj estos kun mi. Ankaŭ la tendaron de Izraelo la Eternulo transdonos en la manojn de la Filiștoj.

Tiam Saul tuj falis laŭ sia tuta longeco sur la teron, ĉar li tre ektimis pro la vortoj de Samuel. Ankaŭ forton li ne havis en si, ĉar li nenion mangis la tutan tagon kaj la tutan nokton. Kiam la virino aliris al Saul, kaj vidis, ke li estas tre konsternita, ŝi diris al li :

— Jen via sklavino obeis vian vocon, kaj mi metis en dangeron mian animon, kaj obeis la vortojn, kiujn vi diris al mi. Nun mi petas, aŭskultu ankaŭ vi la vocon de via sklavino, kaj mi metos antaŭ vin pecon da pano, kaj vi mangu, por ke vi havu forton, kiam vi iros la vojon.

Sed li rifuzis, kaj diris :

— Mi ne mangos.

Sed kiam ŝinsistis super li liaj servantoj kaj ankaŭ la virino, li obeis ilian vocon, levigis de la tero, kaj sidiĝis sur lito.

La virino havis en la domo grasigitan bovidon. Ŝi rapide ĝin buĉis, kaj ŝi prenis farunon, knedis ĝin, kaj bakis el ĝi macojn ; kaj ŝi alportis tion antaŭ Saulon kaj antaŭ liaj servantojn, kaj ili mangis. Kaj en la sama nokto ili levigis kaj foriris.

Dume la Filiștoj batalis kontraŭ la Izraelidoj, kaj la Izraelidoj forkuris de la Filiștoj, kaj falis mortigitaj sur la monto Gilboa. Kaj la Filiștoj kuratingis Saulon kaj liajn filojn, kaj la Filiștoj mortigis Jonatanon kaj Abinadabon kaj Malkišuan, filojn de Saul. La plej grava parto de la batalo estis direktita kontraŭ Saulon, kaj jetis sin kontraŭ lin la arkpafistoj, kaj li estis forte vundita de la arkpafistoj.

Tiam Saul diris al sia armilportisto :

— Eltiru vian glavon, kaj trapiku min per ĝi, por ke ne venu tiuj trapiki min kaj moki min.

Sed lia armilportisto ne volis, ĉar li tre timis. Tiam Saul prenis la glavon, kaj falis sur ĝin. Kiam la armilportisto vidis, ke Saul mortis, li ankaŭ falis sur sian glavon, kaj mortis kune kun li.

Tiel mortis Saul, kaj liaj tri filoj, kaj lia armilportisto, kaj ĉiuj liaj viroj en tiu tago kune kun li.

Kiam la Izraelidoj, kiuj estis transe de la valo kaj transe de Jordan, vidis, ke la Izraelidoj forkuras, kaj ke mortis Saul kaj liaj filoj, ili forlasis la urbojn, kaj forkuris. Tiam venis la Filiștoj kaj ekloĝis en ili.

La sekvantan tagon venis la Filiștoj, por forpreni la vestojn de la mortigitoj ; kaj ili trovis Saulon kaj liajn tri filojn falintajn sur la monto Gilboa. Tiam ili dehakis lian kapon, kaj deprenis liajn armilojn, kaj sendis en la landon de la Filiștoj ĉirkaŭen, por anonci en la domo de iliaj idoloj kaj al la popolo. Kaj ili metis liajn armilojn en la templon de Astarot, kaj lian korpon ili pendigis sur la muro de Bet-Šan.

Kiam la loĝantoj de Jabeš en Gilead aŭdis, kion la Filiștoj faris al Saul, tiam ĉiuj plej kuragaj levigis, kaj iris tutan nokton, kaj prenis la korpon de Saul kaj la korpojn de liaj filoj de la muro de Bet-Šan, kaj venis Jabešon, kaj forbruligis ilin tie. Kaj ili prenis iliajn ostojn, kaj enterigis sub arbo en Jabeš. Kaj ili fastis sep tagojn.

[Ciuj rajtoj rezervitaj.]



*Redaktoro.*—Via rakonto ne estas verŝajna  
*Aŭtoro.*—Verŝajna! Kial?

*Red.*—Kial! Vi diris: sono de pafado aŭdigis, kaj tuj la strato svarmis de policanoj.



— Kian pupon vi volus? demandis la onklo al la nevineto, kiun li enkondukis en la ludilbutikon.

— Ĝemelojn, ŝi respondis.

## Kokino kaj Inkubatoro.

*La ĉarma baptanino*

*Kokino,*

*Starante ĉe la Kovmašino,*

*Ekbekis ĝin, ekflaris*

*Kaj kun aplomb' deklaris:*

*“ Ho, Dio! Kia ilo sia!*

*El naskoaparato tia*

*Aperos ja kokidoj*

*Al ĉies pravaj ridoj!*

*Kaj kia fi-malkonsekvento*

*Terura*

*Ĝin uzi por produkt' de koka gento*

*Anstataŭ la natura*

*Instrumento! . . .*

*Sed, malgraŭ tiu ĉi rezono*

*Jam post monato*

*El aparato*

*Aperis idoj—vera krono*

*De dia fruktedono,*

*Kaj bravaj idoj de l'Mašin'*

*Dikiĝis kaj prosperis*

*Kaj diris mem, ke la Kokin'*

*Malsage konsideris.*

\*\*

*Ho, Esperanto! Mond' koleris,*

*Kiam subite vi aperis.*

*Sed estis vi de klera kovo*

*Kaj venis vi el vera ovo*

*De lingvoj de Eŭropo;*

*Vi ne fiaskis dum la provo,*

*Car naskis vin produktopovo*

*Kaj forto de ciklopo.*

*El “DORNA KARESILO” de BELA MANTO.*



## XVa Scottish Congress.

AT THE UNIVERSITY OF EDINBURGH.

SATURDAY, 19TH JUNE, 1920.

*Provisional Programme.*

*Friday, 18th June.*—At 26, Synod Hall, Castle Terrace, 7 p.m., Registration of Congress tickets, enquiries, etc.; 8 p.m., Welcome by Edinburgh Esp. Soc.

*Saturday, 19th June.*—At University of Edinburgh. 9.30 a.m. *Akceptejo* opens.—Music Class Room; 10, Excursions in Edinburgh under competent guides; 12.30 p.m., Meeting of Federation Council; 1 p.m., Lunch; 2.30 p.m., Congress Photograph; 3 p.m., Congress Meeting; 5.30 p.m., Tea; 7 p.m., Public Propaganda Meeting and Demonstration by Children.

*Sunday, 20th June.*—Visit to Zoo in morning, lunch there and return to Edinburgh for Esperanto Divine Service at 3 p.m.

Congress Tickets 3/- or 2/6 if purchased before May 31st, obtainable at all Scottish Esperanto Societies or Classes, or from

WILLIAM HARVEY, Hon. Sec. XV. Congress,  
31, Comiston Drive, Edinburgh.

CEDRIC F. WHITE, Hon. Sec. Scottish Fedn.,  
280, Bath Street, Glasgow.

## La Nederlanda Lingvo per Esperanto.

de J. W. SEVENHUIJSEN.

## Daŭrigo.

Ni sekvas la Britan kongresanon, kiu vojaĝas al Harlemo. Ĉe la elirejo staras kelkaj esperantistoj, kiuj ricevas lin, ĉar li antaŭe sciigis ilin pri sia alveno. La kongreso estas jam finita, do li nun havas sufiĉan tempon por viziti lernejon kaj pli bone lerni la Nederlandan lingvon. La esperantistoj kondukas lin al la "Leerschool" (Lérshôl) "aan de Leidsche vaart" (an dæ Lejdse vårt) en kiu S-ro Sevenhuijsen ĝoje akceptas lin. Post kelka esperanta parolado S-ro S. proponas, ke li vizitu la unuan klason, kaj ĉiam parolu, kiel la instruistino kaj la gelnantoj la Nederlandan lingvon. Ni eniras:

S. *Fraŭlino, mi havas la plezuron al vi prezenti S-ron P. el Anglujo.*

Juffrouw, ik heb het genvegen u voor te stellen Mn. P. uit Engeland.

Jefrou, ik heb øt gən ügən ü vór tə stelən, Mənér P. uit Engeland.

Fr. *Agrable, mia nomo estas . . . . .* P. *Cu vi permesas al mi, ĉeesti vian instruadon ?*

Aangenaam, mijn naam is . . . . . Vergunt u mij, uw les bij te wonen ?

Āngənām, mejn nâm is . . . . . Vərgunt ü mej, üw les bej tə wónən ?

Fr. *Ho, certe Sinjoro, sed vi komprenos de ĝi eble nenion.*

O, zeker Mynheer, maar u verstaat er misschien niets van.

O, zékér Mənér, mår ü vərstät ør mishín nít̄s van.

P. *Jes, eble, sed mi volas klopodi ion de ĝi lerni.*

Ja mogelijk wel, maar ik wil probeeren iets ervan te leeren.

Jâ, móglək wel, mår ik wil próbérən its ørvan tə lérən.

Fr. *Bone, mi estas komencinta kalkuli laŭ la lerntabulo.*

Goed, ik ben begonnen te rekenen volgens den rooster.

Gûd, ik ben bəgonən tə rēkənən volgəns dən rōstər.

*Johano, venù ĉi tien, antaŭ la klaso !*

Jan, kom eens\* hier, voor de klas.

*Jan, kom øs hîr, vör dæ klas.*

*Nombru ĝis dek, sed distingible, aüdu !*

Tel eens tot tien, maar duidelek, hoor

*Tel øs tot tîn, mår duidələk, hör !*

\* eens signifas ordinare iafoje, sed ĉi tie oni uzas ĝin nur kiel afable, bonvole.

J. *Een, twee, drie, vier, vijf, zes, zeven, acht, negen, tien.*

ēn, twē, drî, vîr, vejf, zes, zēvən, alht, nēgən, tîn.

Fr. *Bone tiel ! diru nun kiel aĝa ci estas.*

Goed zoo ! zeg nu eens, hoe oud je bent.

Gûd zô ! zeg nü êns, hû oüd jə bent.

Fr. *Nu, tio estas agrable! Kian feston ci tiam festos !*

Zoo, dat is prettig ! Wat een feest zal je dan vieren !

Zô, dat is pretəg ! Wat øn fést zal jə dan vêrən !

*Mario, venu ci nun ĉe mi !*

Marie, kom jij nu eens bij mij !

Mâri, kom jej nü êns bej mej !

*Skribu dek du streketojn sur la tabulon.*

Schrijf eens twaalf streepjes op het bord.

Shrejf øs twâlf strépjøs op øt bord.

*Forvišu tri, kiom restas?*

Veeg er drie uit, hoeveel blijven er over ?

Vêg ør drî uit, hûvîl blejvən ør bôvər ?

*Nau:—bone! Ĉi tie havas mi dek kvin cendojn.*

Negen:—goed ! Hier heb ik vijftien centen.

Négən:—gûd Hir ! heb ik vejftîn sentən.

*Petro, diru al mi, kiom da penco mi havas ?*

Piet, zeg me eens, hoeveel stuivers ik heb !

Pít, zeg mə êns, hûvîl stuivərs ik heb !

*P. Vi havas tri pencojn.*

U heeft drie stuivers.

Ü héft drî stuivərs.

Fr. *Kaj kiom da dupencoj ?*

En hoeveel dubbeltjes ?

En hûvîl dubältjøs ?

*P. Unu dupenco kaj kvin cendoj.*

Een dubbeltje en vijf centen.

Èn dubältje en vejf sentən.

Fr. *Bone tiel, nun ni prenu la legolibron, sercu la naŭan lecionon paĝo dek-tria.*

Goed zoo, nu nemen we het leesboek, zoek op de negende les bladzijde dertien.

Gûd zô, nü nêmen wə øt lêsbûk, zük op də nêgəndə les bladzejdə dərtîn.

S-ro S. nun proponas viziti alian klason kaj la Anglo diras salutante la instruistinon :  
 Dag Juffrouw, ik dank u wel, ik heb al wat Hollandsch geleerd, maar uw leerlingen zijn  
 Dag Jefroū, ik dank ū wel, ik heb al wat Holands gēlērd, mār ūw lērlingēn zijn  
 me nog de baas !  
 mā nog dē bās !

Tio ĉi signifas vorte : *Tagon, Fraŭlino, mi dankas vin bone, mi estas jam ion Holandan lerninta, sed viaj lernantoj estas al mi ankoraŭ la estro.*

La Holandanoj ĉiam diras : "dag !" ĉu ili alvenas, ĉu ili foriras. La diferenco estas ofte nur en la tonalteco, eĉ du tonoj en unu vokalo, ekzemple *b* kaj *as* (malgranda tercio), almenaŭ kiam oni salutas forirante.



## Esperanto kaj Telegrafio sen Fadenoj (T.S.F.)

Fariĝis nun tute banale diri, ke ju pli disvolviĝas interhomaj komunikiloj, des pli forte estas sentata la bezono de lingvo internacia.

Inter la mirindaj eltrovoj de la lasta tempo, kiuj plej faciligis internaciajn komunikojn, radiotelefonio kaj radiotelegrafo certe staras sur la unua vico. Ni hodiaŭ facile parolas aŭ skribas trans centojn kaj milojn da kilometroj sen ia antaŭa aranĝo de interligantaj fadenoj, se nur tie malproksime troviĝas aŭskultanto kun taŭgaj aparatoj.

Sed, ho ve, la kompatinda aŭskultanto ofte nenion komprenas en ĉio, kion li tamen tute klare aŭdas el ĉiuj kvar punktoj de la horizonto ! Ŝipo sur maro ĉutage proksimiĝas al multaj diverslingvaj aliaj ŝipoj. Ilin voki kaj alparoli estas tute facile afero, sed kiam tuj venas responde, ĝi estas nur senviva kaj senenhava brujo. Mi ĉiam memoros tian malfacilan interparolon, kiun mi aŭdis inter angla ŝipo kaj franca senfadena stacio en Cherbourg. La ŝipo simple demandis pri iaj kostoj de transendo. Tia fušajo estis la vanaj provoj de interkompreno, ke fine la stacio sendis al la ŝipo la signalon "atendu". . . . kaj la malfeliĉa ŝipo sendube ankoraŭ nun atendas, ĉar la staciisto neniam plu ĝin revokis.

Tiel akra estas la bezono de interkomprenilo, ke "la bezono kreis organon,"—sed kian organon ! Areton el 45 triliteraj grupoj, kiuj servas por demandi aŭ respondi pri la plej ofte bezonataj aferoj, kiel, ekzemple, jene :

- QRA ?
- QRA Campania.
- QRG ?
- QRG Cunard. QRZ, QRO.
- ORK ?
- ORK, QRU ?
- QRU, k.t.p.

Tia maniero de interparolo certe ne apartenas al la plej facilaj kaj oportunaj, ĉar ekzistas nur 45 tiaj demandoj-respondoj, kaj, kvankam ilia nombro estas tre malgranda, estas jam malfacile ilin ĉiujn memori perfekte.

Tamen, malgraŭ tia *malperfekteco*, la "senfadena lingvo" ĉutage faras ŝatindajn servojn al ĝiaj uzantoj. Pro internacia *interkonsento* ĉiu radiotelegrafoisto ja komprenas jene la supran iom algebran interparolon :


- Kiel estas nomata via stacio ?
- Gia nomo estas Campania.
- Al kiu marvetura linio vi apartenas ?
- Mi apartenas al la Cunard Linio. Viaj signaloj estas malfortaj. Pligrandigu la energion.
- Kiel vi nun ricevas ?
- Mi ricevas nun bone. Ĉu vi havas ion por mi ?
- Mi havas por vi nenion, k.t.p.

Sed kiu ne vidas, kiom pli oportuna estus lingvo internacia, per kiu oni povus *cion* diri, kaj ne sole uzadi nur 45 antaŭpreparitajn demandojn kaj respondojn ? Per tia lingvo la angla ŝipo, pri kiu mi parolis, povus facile ricevi ĉiajn deziratajn sciigojn, dum en la 45 nunaj litergrupoj troviĝas neniu, pli malpli ĝuste difinita por komprenigi ĝian demandon.

Ne sole por uzado de senfadena telegrafo lingvo internacia farus grandajn servojn, sed kompreneble ankaŭ por ĝia studado, kiel por studado de ĉiaj aliaj sciencoj kaj teĥnikoj. Per ĝi fakuloj povus interŝangi teĥnikajn sciigojn aŭ kompare studi la diversajn naciajn radiolegarojn (interalie pri privata eksperimentado, kiu en kelkaj landoj ŝajnas terura kaj malpermesta afero, dum en aliaj ĝi ĝuas enviindan liberecon). Eble ili havus por tio profiton starigi ian internacion societon, kiu interalie zorgus pri ellaborado de teĥnika radiovortaro.

Se inter la diverslandaj esperantistoj troviĝas profesiaj aŭ amatoraj "senfadenistoj," la subskribinto sciigus kun granda plezuro pri ilia opinio.

D-RO PIERRE CORRET,  
 19 Boulevard de la République, Versailles  
 (Francujo).  
*(Esperantaj Gazetoj estas petataj represi.)*



## Competition for Boys and Girls.

Conducted by  
Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95, Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest number of marks.

*N.B.*—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

### FOURTH COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 20th April.

#### (a) Moluskoj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de moluskoj kaſitajn en la jenaj frazoj :—

1. Ĉu vi deziras, ke mi telegrafu al via patrino.
2. Per mia akra bajoneto, mi pikvundis la malamikon.
3. Mi timas, ke estos tre malfacile al la oficiro daŭrigi sian universitatan edukadon.
4. Ĉu vi abonas la amerikan kronikon Esperantan?
5. Pro siaj gravaj vundoj la oficiro marĝas tre malrapide.

#### (b) Okupoj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de okupoj kaj profesioj, kaſitajn en la jenaj frazoj :—

1. Tiuspeca arbo troviĝas abunde en Ameriko.
2. Si petegis, ke oni ne plu moku lin.
3. Miaj gepatroj donacis al mi litcambran meblaron.
4. Oni ne plu garantias la kvaliton de gantoj.
5. Kiam ŝi interrompis, mi silentis.
6. Jen tre freſa fiſo! Mi jus ĝin aĉetis de fiſkaptisto.

#### (c) Enigmo.

Mia tuto konsistas el tri partoj — kapo, korpo kaj vosto. Sen la kapo mi estas manĝilo; sen la vosto mi estas senhalta rondiro, sen kapo, sen vosto mi estas nur insekto; kun kapo kaj kun vosto mi estas utila dissendojo.

### RESULT OF THE SECOND COMPETITION.

The highest number of marks in this Competition has been gained by :

WALTER KIMBERLEY (age 13),  
Stanley Road Boys' C.C. School, Worcester.

*Honours List (12 marks).*—Gertrude Loader, Winifred Parfitt, Freda Young, Radstock C.C. School, Bath; John Aitken, Thos. Cuthbert, Jas. Dickson, Jas. Donaldson, Jas. Finlay, Meg Fleming, W. Fraser, David Hutchison, Annie Hutton, Dan. Jack, Robt. Jamieson, W. S. Kinghorn, Bella Leiper, Thos. Macdonald, Muriel Macmillan, John Masson, Geo. Pattison, John Ritchie, Robt. Stewart, Alex. Watson, Rich. Wimberley, Donaldson's Hospital, Edinburgh; Fred Miles, Manchester; Fred Ashcroft, Flor. Barratt, Arthur Dean, Edith Dowling, John Drinkle, John Emery, Norman Finlow, Eric Gordon, Frank Harley, H. Higginbotham, Thos. Hunter, Frank Jackson, Fred. Jones, Frank Lees, Winnie Mellor, Ernest North, W. Rostron, John Stanbrook, Gerald Ward, Jack Warrington, Claude Watkins, May Williams, Green Lane C.C. School, Patricroft; Edna Pearson, High School, Sheffield; Albert Jones, Bertram F. V. Street, Stanley Road Boys' School, Worcester; Jack Severn, St. John's College, Worcester.


*Hon. Mention (11 marks).*—Kath. Langley, Lady Manners' School, Bakewell, Buxton; Ada Fraser, Donaldson's Hospital, Edinburgh; Dorothy Oakes, Northcote Girls' School, Armley, Leeds; Rich. Ashcroft, Eric Bamford, Flor. Banks, Cyril Brown, Sydney Brown, Phyllis Butterworth, S. Chapman, Fred Clarke, Geo. Crawshaw, Harry Crompton, John Fleming, Edith Gardner, Wilfred Gardner, Alfred Grayson, Arthur Harris, Ernest Humphries, Cyril Johnson, Dennis Kirwin, Ernest Lees, H. Millward, Fred Monks, Godfrey Nelson, Geo. Peters, Barry Savigny, Arthur Senior, Walter Smith, Charles Trott, Agnes Williams, Kenneth Wilson, Mabel Worthington, Patricroft; Reginald Thomasson, St. Paul's Boys' School, Worcester.

*N.B.*—211 Competitors from 14 schools on roll, to date.

### SOLUTIONS.

(Second Competition, p. 24).

- (a) Landoj :—(1) Rus, (2) Lap, (3) Dan, (4) Ital, (5) Austr, (6) Pers.
- (b) Moneroj :—(1) centim, (2) groš, (3) denar, (4) frank, (5) šiling.
- (c) Enigmo :—Man-da-ren.



### To Save the Children in Vienna.

PLEASE HELP!

Contributions received for the ESPERANTIST COMMITTEE IN VIENNA by the Friends' Emergency and War Victims Relief Committee:

|   | £ s. d.         |
|---|-----------------|
| Buckhurst Hill Esperantist Group, per Miss Stacey ..... | 1 0 0           |
| Charles G. Stuart-Menteth .....                         | 0 10 0          |
| Croydon Esperanto Society, per J. Bredall .....         | 1 10 0          |
| Charing Cross Esperanto Club, per A. Shater .....       | 2 0 0           |
| Other Esperantists, per A. Shater .....                 | 1 2 0           |
| Sheffield Esperanto Association .....                   | 2 0 0           |
| Mrs. M. Theodore .....                                  | 0 11 0          |
| "British Esperantist" .....                             | 1 0 0           |
| Per M. C. Butler .....                                  | 1 11 0          |
| Woolwich Esp. Society .....                             | 1 15 0          |
| Winifred Bothwell .....                                 | 1 0 0           |
| <br>  |                 |
| To March 25th .....                                     | <u>£13 19 0</u> |

## Nekrologoj.

### PASTRO ARTHUR P. SOUTHEE.

Per la morto de ĉi tiu sinjoro la 28an de Oktobro, 1919, ni perdis ankoraŭ unu el la plej malnovaj pioniroj, de nia movado en Britujo.

Kiel unu el la organizintoj de la vizito de D-ro kaj Sinjorino Zamenhof kune kun granda anaro da Esperantistoj al Folkestone dum la Unua Kongreso en Bulonjo multaj ankoraŭ memoros lin kaj lian afablan helpe-mecon.

Li estis dum kelkaj jaroj Prezidanto de la unua Grupo starigita en Folkestone.

Profunde konvinkite pri la benoj, kiujn la alpreno de la Internacia Lingvo havigos al la mondo, li fervore, pregis pro ĝi kaj estis ĝia vigla propagandisto ĝis la tago de sia subita morto. Profesie Sinjoro Southee estis dum tridek ok jaroj estro de granda lernejo en Ramsgate. Li mortis en sia sepdek-naŭa jaro.

### PASTRO CHARLES J. SENIOR, M.A.

Tre bedaŭre ni sciigas pri la morto la 19-an de Januaro de ĉi tiu samideano en la sepdek-sesa jaro de lia aĝo.

Rektoro de Lillingston Lovell en Buckinghamshire li estis tre estimata ne nur en sia paroĥo sed ankaŭ en la tutaj cirkaŭaĵoj. De multaj jaroj li estis entuziasma Esperantisto, ano kaj Fratulo de la B.E.A. Li estis unu el la fondintoj de Eklezia Esperantista Ligo kaj ĉiam fervove laboris por ĝi.

Al lia edzino kaj tuta familio ni respektas esprimas niajn sincerajn kondolencojn.

### JOSEPH RHODES.

MORTIS 28. FEBRUARO, 1920.

Subite kaj tute neatendite la morto forrabis de nian amatan amikon kaj kunlaborinton, Jozefo Rhodes el Keighley; kiu estis, se ne la unua, almenaŭ la plej vigla kaj plej bona el la pioniroj de la Esperanta movado en Britujo. En ĉi tiuj tagoj estas facila afero propagandi la karan lingvon inter niaj amikoj; ne estas malfacile eĉ priparoli ĝin inter skeptikuloj, ĉar ĉiuj jam aŭdis ion pri la movado, kaj la spritulon antau tre longe ĉesis fari siajn sercojn kontraŭ niaj pretendoj.



## CHRONICLE.

### COMING EVENTS.

**Divine Service in Esperanto** will be held on Sunday, April 14th, at 3.15, in Harecourt Church, St. Paul's Road, Canonbury, N.1., when the speaker will be Mr. W. H. Dennis.

Sixpenny teas will be provided by Miss F. H. Hanbury at 454, Camden Road, close to the junction of several tram, bus and train routes. Will those intending to come please let her know on the previous Friday, so that she may know how many to cater for.

The Secretary of the Diserva Komitato, c/o B.E.A. would be pleased to hear from anyone willing to help in these monthly services either as a speaker or as a soloist.

**Charing Cross Club** meets every Wednesday at 17, Hart St., W.C.1., at 3 o'clock. Visitors are always welcome. Tea about 4.45 at "Lyons," 123, High Holborn, opposite Holborn Restaurant.

**Conference of the Yorkshire Federation and B.E.A. Meeting.**—This will take place on the premises of the Friends' Meeting House, Manningham Lane, Bradford, on Saturday 17th April. The Conference will open at 3.0. Discussion will take place of a paper read by Mr. J. T. Holmes on "Internacia agado de la

Ni jam scias, ke la afero sukcesis en ĉiuj rilatoj de la internacia vivado, kaj ili ne povas kontraŭstari sukcesplene la argumentojn, kiujn ni povas prezenti al ili. Sed en la plej unuaj tagoj estis tute alia afero. Neniu aŭdis pri Esperanto; neniu kredis la pretendojn, kiujn la pioniroj faris rilate al la lingvo. Ĉiuj rigardis ilin kiel frenezulojn. Por fari sukcesplenan propagadon, oni bezonis en tiuj tagoj grandegan kuraĝon kaj fidon, kaj neniu posedis tiujn ecojn je pli grada grado ol nia jus perdita amiko, Jozefo Rhodes. Ĉiuj Esperantistoj devas honori lian memoron, kaj, laŭ povo, sekvi lian ekzempon. Mi konis lin dum multe da jaroj, kaj ĉiam li havis la saman ĝentilan, modestan, mildan sintonadon, la saman paciencon kaj ĉiamvarman entuziasmon kaj fidon. Estante religiulo, kun grandega fido en la Plejpotenca, li laboris senĉese por helpi la disvastiĝon de Esperanto, ne pro komercaj profitoj, sed por plirapidigi la unuiĝon de la diversaj nacioj en unu "grandan rondon familiaran;" li dediĉis preskaŭ sian tutan libertempdon por tiu celo, kaj la semoj de li semitaj nepre havos gloran rikoltton en la tuja estonteco.

Koni lin, estis ami kaj estimi lin. Je la tombejo sin trovis centoj da geamikoj, kiuj venis el ĉiuj partoj de la lando por montri sian respektagon por la mortinta samideano, kaj grandamaso da floraj steloj kaj girlandoj estis metita per amantaj manoj sur lian ripozejon.

Jozefo Rhodes estis bonega servanto de la Plejpotenca; li estis fidela kaj senlaca laboristo por nia kara afero; li estis brilanta ekzemplo por ĉiuj samcelanoj. Li jam ricevis sian rekompencon; sed por honori lian memoron, ni devas labori por lia elektita tasko eĉ pli diligente ol antaŭe. Certe, tiu estus por li la plej akceptebla dankesprimo por ĉio, kion li mem faris en nia movado.

Al lia vidvino nia simpatia samideanino, Sino Rhodes, la tuta Esperantistaro sendos sian koran kaj plej profundan simpatian. Ni pregas, ke la bona Dio helpu ŝin, ke ŝi fortigu ŝian spiriton, por ke ŝi povu elporti la grandan doloron, kiu frapis ŝin. Per la morto de Jozefo Rhodes la Esperanta movado en Britujo suferis grandan perdon, sed per liaj kuraĝo, laborado, lerteco kaj fido dum la vivo, ĝi ricevis pli grandegan forton kaj profiton. Li restu pace!—J.M.

(Photographs of the late Mr. Joseph Rhodes can be purchased from Mr. Bruce Johnstone, Vic-Del. U.E.A., Spawholme Crescent, Keighley.)



Instruistaj Rondoj." Tea 4.30. At 5.15 the Council of the B.E.A. will meet, while non-Councillors will visit neighbouring sights. At 7.30 there will be a public meeting presided by the Lord Mayor, and addressed among others by the President of the B.E.A. and Mr. J. Merchant. On the programme are an oral translation competition for children learning Esperanto in elementary schools in Yorkshire, and several musical items.

On Sunday afternoon addresses will be given to various Brotherhoods. On Sunday evening members of the Conference are invited to the Friends' Meeting for Worship; and there will be given (at 8.30) an address to the Y.M.C.A. On Monday, 1.40—2.30, an address will be given to the Commercial Club, Bradford Commercial Club. A golf match is also being arranged.

**To Collectors.**—An Autograph letter of Dr. Zamenhof will be sold to the samideano sending in the highest offer by April 30th, 1920. The whole proceeds will go to the London Esperanto Club, by the kindness of the donor, Mr. H. A. Epstein. Offers should be sent on a postcard addressed to "Autograph," c/o B.E.A., 17, Hart Street, W.C.1.

**Rendevuoj por Esperantistoj en Aprilo.**—*Sabate.*—Granda vestiblo de la Muzeo de Artoj "Victoria and Albert." Por malfavora vetero estas subvojo de stacidomoj South Kensington al alia enirejo. Horo 4.30. Restoracio A.B.C. apud la stacidomo (Metropolitan). *Dimanĉe.*—3.15. La statuo de "Achilles," Hyde Park Corner. 4.30 Restoracio Lyons, 7, Brompton Road, apud tubstacio Knightsbridge (kontraŭ "Hyde Park Hotel"). Bonvolu porti la stelon videble.

#### NOVAJ GRUPOJ.

Kun plezuro ni sciigis, ke en du lokoj la Grupanoj jus decidis aliĝi al B.E.A., nome en WIMBLEDON (London, S.W.) kaj en NORTHAMPTON. Ni varme bonvenigas ilin kaj esperas por ili longan kaj sukcesplenan vivon.

#### LONDON.

**Forest Hill, S.E.**—An interesting debate took place on February 23rd at the St. John's Literary and Debating Society on the subject of an international language. Mr. S. R. Marshall put the case for Esperanto, and an interesting discussion followed, after which a vote was taken which resulted in a majority in favour of the adoption of the "Internacia lingvo." T. G.

**Sydenham, S.E.**—It was just over a month ago when a meeting was called in Sydenham, organized by Mr. W. K. Robinson. Mr. W. R. Vine took the chair and an address was given by Mr. V. Grimmett, of Lewisham. The address was followed by a discussion. Sino Sujadinoff, from South Russia, greatly interested us by an account of her arrival in this country when she had no knowledge of the English language, and how she afterwards learned the international language and found herself much more at home in our land.

The Society made a very good start with twenty members. Mr. Grimmett was elected President and Mr. Vine Treasurer.

Among our members may be mentioned Mr. S. R. Marshall, of the Commercial Language Committee, and Mr. Lambert, B.A., who is well known to all Esperantists.

Further particulars can be obtained from the secretary, Mr. W. K. Robinson, 43, Trewsbury Road, Sydenham, S.E.26.

**Sud-Londono.**—Belega vespera festo okazis la 7an de Feb. ĉe Deerhaddn College, 59, Brixton Hill, la kunvenejo de la Sud-Londona Grupo, sub la prezido de Sino Blaise.

Inter la multaj gesamideanoj, kiuj ĉeestis la feston, estis la Sinjorina Mošto Katherine Stuart (varbitino de Kol-o Pollen, kaj lernintino de S-ro Blaise), kiu faris la plej gravan paroladon de la vespero. Si klarigis sian "Ligon de la Nova Ordono," kiu estis starigita antaŭ nelonge, kaj kiu celas fariĝi vere internacia per la lingvo Esperanto. Ĝiaj principoj tre similas la "internan ideon" de Esperanto mem. "Civilizado per la Homamo" estas la devizo de tiu anaro de liberaj homoj unuigitaj per amikeco kaj por la servado al la homaro. Mondunueco estas la celo de la Ligo, kaj tiu-cele ĝi penas konsciigi la homaron pri ĝia propra solidareco aŭ suba spirita unueco. La plej simplaj aferoj ofte estas la plej grandaj. Sur korojn plenajn de la amo kaj bonvolo al la homaro alvenas la Spirito de Dio, kiu estas la spirito de unueco.

Nomoj efektive en Esperanta rondo negravas; sed, tamen, mallonge estu enskribitaj la nomoj de tiuj, kiuj gajigis nian feston: la gastemaj Finoj Walker, en kies domo ni renkontiĝis; nia amata prezidanto Sino Blaise; ŝia bonkora edzo, frato de ĉiuj; S-ro Martin, kiu ludis la fortepianon kun lertaj fingroj; S-ro Moy Thomas, per violono kaj kanto, helpata de sia edzino; F-inoj Fiddian kaj Higgins, kiuj deklamis diverse; F-inoj Crawley, kiu rakontis timigan anekdoton; S-ro

Hayton, kiu interesege parolis; kaj fine la multaj gehelpantoj, kiuj provizis kaj servis kafon kaj mangajojn.

Dum tiu lasta programero la grupanoj kaj gastoj trovis tempon por gaja babilado, kaj la Sinjorino Katherine Stuart disdonis foliojn pri sia ligo, kies titolo en oraj literoj bele ornamis la murojn de la ĉambro. Ne nur sur la muroj, sed en la koroj estu enskribita tiu titolo, kies interna ideo povas savii la mondon, ĉar la amo venkas ĉion.—Ho Ho.

**Aldono de la Grup-Sek.**—Leginte la supran raporton mi trovas, ke S-ro Harrison Hill tie modeste forgesisian propran parton. Sed kiuj konas lin, tiuj scios ankaŭ, ke la festo ŝuldis multege al lia talento, kiu ĉiam ĉarmas liajn aŭdantojn.—D. FIDDIAN.

**Training College Students and Esperanto.**—On February 15th Mr. G. J. Cox, Vice-President of the B.E.A., gave a very interesting address to the students of St. John's College, Battersea.

Mr. Cox began by explaining the purpose of Esperanto. He stated that the founder of the language, Dr. Zamenhoff, wished to give to the world an ideal means of universal intercourse, and he maintained that the present League of Nations would be greatly assisted by the acceptance of such a language. His main purpose in advocating Esperanto was not for its commercial use, but to make it possible for the peoples of the world to understand one another and to interchange ideas. He further explained that in this language the roots of the words are taken mostly from French, English and German, and he gave examples of word-building which greatly appealed to his hearers. He emphasised another striking advantage of Esperanto, namely, that it is phonetic and therefore its pronunciation presents no difficulties when once the 28 letters and their 28 sounds have been mastered.

Questions being invited at the end, one speaker asked if Esperanto could be suitably set to music. Mr. Cox, in reply, sang a verse of "The Swanee River" in Esperanto and the audience enthusiastically admitted the claims of the language to be musical.

Mr. Cox earnestly appealed to the students to take an active interest in Esperanto when they left college, and the meeting closed with a hearty vote of thanks to the speaker.

#### ELSEWHERE.

**Barry.**—*Young Peoples' Fellowship.*—Mr. R. T. Evans, Headmaster of Romilly Road Boys' School, addressed a meeting of the Fellowship of the Congregational Church on February 25th, by special request. There was a large attendance and Mr. Evans addressed himself first to the need of an international language, and second: How Esperanto satisfies that need. Many questions were asked and at the close there were many inquiries about the language and a desire to learn it. An effort will be made next winter to start an Esperanto class under the Evening Schools Committee, in connection with the educational section of the Church.

**In the Elementary School.**—At the request of the sub-committee of the local Education Authority, Mr. R. T. Evans, who had sent in an application for permission to include Esperanto in the curriculum, was invited to present the case for its adoption personally. He succeeded in getting the consent of the sub-committee at its meeting on February 23rd and on March 2nd this was formally approved by the Education Authority. It will be taught in the fourth and fifth standards for 12 months as an experiment. Mr. Evans is confident of the result and attributes the success of his appeal largely to the pamphlet "Esperanto in the Schools." The subject has been taught provisionally for about two months and already some of the children correspond with scholars in Ĉeho-Slovakujo.

Many of the parents take a keen interest in the language and Mr. Evans has been specially invited to give an address on it to the Barry Labour Party.

**Belfast.**—Merkredon la 25an de Februaro okazis la jarkunveno de la Grupo, kiam ĉirkaŭ tridek anoj kun ge-amikoj ĉeestis.

Post vistludo la Hon. Sek-ino legis la raporton, kiu estas tre kontentiga. Si ankaŭ transesprimis al S-ro Moorcraft la dankojn de la grupanoj pro lia afable konsento agi kiel Delegito—Konsilanto, ankaŭ pro lia sindonema servado.

Respondante S-ro Moorcraft bonvenigis la novajn membrojn kaj deziris por ili, tiel multe da ĝuo el la grupkunvenoj, kiel li kaj la aliaj membroj spertis.

La partoprenantoj poste ludis kaj kantis Esperante; la lasta ero bone kondukita de S-ino Treanor (piano) kaj S-ino Gallagher (violono).

28an Feb.—La Sekretariino faris antaŭ la junula sekcio de la Y.M.C.A. neformalan paroladon pri "Esperanto, ĝia deveno, neceso, utileco kaj simpleco."

Poste sekvis leciono, kiu traktis la pli simplan parton de la gramatiko, kaj la partoprenantoj tradukis laŭtvoĉe malgrandajn frazojn.

Oni atendas fruktrezulton inter la junuloj.

**Birmingham.**—La Grupo ŝangis sian sidejon kaj nun kunvenas en la Oriental Café, Hill Street, je merkredo.

Ĉiuj kursoj progresas bone, kaj notinde estas, ke tiu ĉe la Municipal Chamber of Commerce pligrandiĝis je 50 procento, de post ĝi komenciĝis, kvankam la plej multaj kursoj ĉe tiu Instituto malpligrandiĝis.

Nia bonekonata samideano S-ro H. A. Luyken vizitis nin dufojojn kaj afable faris paroladetojn pri siaj spertoj dum vojaĝo al Holando kaj pri "Mondrekonstruado."

Je la 18a de Februaro okazis vistludado, kiu estis sukcesa kaj kontentige helpis al la kluba kaso.—E. B.

**Bolton.**—Festeto okazis je la 29a de Januaro por rebonvenigi la soldatojn grupanojn, S-rojn Hall kaj Bates, malmobilizitajn el la armeo.

Bonvenigajn parolojn faris la Prezidanto, S-ro J. Birtwistle, kaj S-roj Miller kaj Walch. Kelkaj malnovaj kaj neofte ĉeestantaj samideanoj ĉeestis, kaj la vesperon oni pasigis per ludoj kaj interbabilado.

Leteroj ricevitaj el diversaj Grupoj responde al petoj faritaj al ili de grupanoj niaj, kiuj deziris informon pri la progreso de Esperanto en ilia regiono, estas legitaj kun multe da intereso. La sendintoj de la letero bonvole akceptu la salutojn kaj dankojn de la Bolton 'a grupanaro pro siaj klopodoj kaj komplezemo tiurilate.

